


Jen Buiteno



JEN-Bulteno Organo de la Junularo Esperantista de Nord-Ameriko
Marto/Aprilo, 1965

Sendu kotizojn al: Stanley F. Cohen, 16 Long Avenue,
 Allston, Massachusetts 02134

Sendu materialon por la JEN-Bulteno portempe al:
 Humphrey Tonkin, 7 Linnaean St., Apt. 6, Cambridge,
 Massachusetts, 02138

Ĉi tiun numeron redaktis: Humphrey Tonkin kaj Julie Crandall.
 Tajpis, Julie Crandall

Estraro de JEN:

Stanley F. Cohen Kasisto
Ann Bodine Sekretario
Humphrey Tonkin Komisiito pri Eksterlandaj Aferoj
Richard P. Kollin
Jonathan R. Pool
Robert Davis

Reprezentantoj al JEN:

Arthur Morse Okcidenta Massachusetts¹
Naomi Sabghir Universitato de Maryland
James Craighead Long Beach Polytechnical H.S.,
 Kalifornio.
Pat Spaeth San Diego
Nelly Perez Yip Portoriko
Fred Shell Universitato de Kalifornio, Berkeley
D-ro R. Ring Muhlenberg College, Allentown,
 Pennsylvania

JEN petas ke ĉiu alia junulara Esperanto-grupo sur loka aŭ lerneja
nivelo elektu unu el siaj membroj kiel oficialan reprezentanton
al JEN. Sendu la nomon de la reprezentanto al la Sekretario.

Ĉiujn ĝeneralajn komunikojn oni sendu al la Sekretario --
F-ino Ann Bodine, Sage Hall, Cornell University, Ithaca, N.Y. 14850.

RENOVIGO

Tiuj anglaparolantoj kiuj ŝoviĝis tra la eduka maŝino de la gimnazio, elvenis plenkreskaj (kvankam iom kontuzoplenaj) kun la beleta scio pri kvadrataj ekvacioj, la triparteco de Galujo kaj la poezio de Chaucer - kiuj laŭ ĉiuj indikoj perfekte pretigas ilin por ĉiuj seniluziigoj kaj bataloj de la Moderna Mondo. Se ili ne kapablas elbuŝigi la sonajn hieroglifikaĵojn de la ĵusmenciita poeto, almenaŭ ili scias kiu li estas -- ke li verkis pri la mezaj civitanoj de epoko iom mise nomata la Mezepoko (se iam ekzistis Mezepoko, tio devus esti la 20-a jarcento -- la epoko de la meza homo, kreaĵo kaj amato de la reklamistoj) -- ke li eternigis la ĉarmon de Cresida de Trojo, kaj la belecon de la revenanta printempo. Homoj kiuj profunde studis la temon pli ol ni, nomas ĉi tiujn celebroyojn de printempo, konataj tra la tuta mezepoka literaturo, "reverdecoj". Hodiaŭ, en niaj hermetikaj apartamentoj kaj delikate varmigitaĵoj -- inter niaj duŝejoj kaj niaj elektraĵoj panbruligiloj -- ni emas forgesi la printempon, aŭ karakterizi ĝin kiel periodon kiam tro varmas por skii kaj tro malvarmas por naĝi.

Sed ni ne forgesu la signifon de la printempo -- la sezono de reverdigo kaj renovigo. Tio inkluzivas renovigon de fortoj -- nova laboro, novaj taskoj, novaj perspektivoj.

Eĉ JEN bezonas la printempon. Kion vi faris por elekti novan Estraron? Ĉu vi helpis en la kolektado de subskriboj por la propono de Universala Esperanto-Asocio al UNO? Ĉu vi fariĝis individua membro de UEA? Geoffrey Chaucer, kiu (kiel Virgilio pri kristaneco) trofruis por esti esperantisto, ne neglektus tiajn aferojn kiel integrajn partojn de la printempo. Almenaŭ tio estas nia opinio.

KIEL INDIKI LA FAMILIAJN NOMOJN?

La naciaj kutimoj pri skribo de propraj nomoj estas tre diversaj. Por ĉinoj, kutime estas skribi unue la familian nomon, kaj poste la persona(j)n: Maŭ Zedong. En aliaj landoj same. Male, por la plimulto de eŭropanoj la kutima ordo estas persona-familia: William Shakespeare. Tial, legante nekonatan nomon, oni ofte ne scias, kiu parto estas la familia nomo. Se temas pri alfabeto ordigo, ekz. listigo de nomoj en kongresa libro, membrokartaro aŭ simile, tio kreas konfuzon.

Ekzistas diversaj proponoj, kiel solvi tiun etan, sed ĝenan problemon en Esperanto. Unu ebleco estas plena majuskligo de la familia nomo: MAŬ Zedong, William SHAKESPEARE. Tiu sistemo, tamen, donas iom malegalan aspekton, se en iu teksto troviĝas multaj nomoj. La samo validas pri kursivigo aŭ dika presigo, kiuj en ĉiu okazo ne taŭgas por manskribo.

Alia ebleco estus instigo al ĉiuj, konformiĝi al la sinsekvo persona-familia. Pledo por tiu solvo aperis -- atentinde -- en Hungara Esperantisto (1964, aŭg., p. 11). La aŭtoro argumentas, ke "Esperanto estas Internacia Lingvo kreita laŭ komuna uzo de la eŭropaj lingvoj kaj ni devas akomodiĝi al la ĝenerala uzado, eĉ se tiu ne en ĉio plaĉus al ni." En la nacia lingvo, hungaroj ĉiam skribas unue la familian nomon: Petöfi Sandor. Efektive, multaj hungaroj, skribante en Esperanto, uzas la sinsekvon persona-familia: Julio Baghy. Sed kiel konvinki ĉinojn pri tiu solvo? Kiel skribis hungara leganto de "Esperanto": "Ĉinoj ne emas emiti eŭropajn kondutojn, ĉar kutimo nacia estas potenca forto." Li daŭrigas: "La solvon prezentas la praktika vivo mem. Kiam oni enregistras nomojn, tiam staras je la unua loko la familia nomo, sekvas komo, kaj nur poste troviĝas la persona nomo." Li proponas, ke tiuj popoloj, kiuj skribas unue la familian nomon, aldonu komon, kaj mem subskribas jene: Pados, Imre.

Malavantaĝo de tiu sistemo estas tio, ke ĉe manko de komo oni ne povas scii, ĉu (a) la dua nomo estas la familia,

(daŭrigo sur p.18)

LA JUNULARA SOMERO
Eventoj kiujn vi rajtas ĉeesti!



21-a Internacia Junulara Kongreso
de T. E. J. O.

8 — 15 de aŭgusto, 1965

Sub la aŭspicioj de Gubernio
Siga kaj Urbo Ootū

Koresponda adreso - 21-a IJK, Kansai Esperanto-Renmei,
3-10 Nakatu-Hamadori, Ooyodo-ku, *Osaka*, Japanujo.
Telefono: (Osaka) 371-7526
Telegramkodo: ESPCENTRO OSAKA

**Invito al 21-a IJK, unika por la
Tutmonda Movado
de Esperantista Junularo**

Japanaj junaj esperantistoj anticipas la gajan kaj feliĉan renkontiĝon kun multaj junaj geamikoj el plej diversaj nacioj de la mondo, okaze de la 21-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO, kiu okazos tuj post la 50-a UK en Tokio, en la urboj Ootū kaj Kioto.

Ambaŭ urboj estas famaj enlande kaj mondvaste pro turisma nepraĵo en Japanujo kun tradiciaj kaj pitoreskaj vidindaĵoj. Precipe la nomo Kioto estas famkonata kiel la ĉefurbo de malnova Japanujo. La du urboj altiras al si ĉiusezone grandegan nombron da turismaj vizitantoj enlandaj kaj eksterlandaj.

La 21-an IJK-on aŭspicias la Gubernio Siga kaj Urbo Ootū, kiuj promesis ne nur subteni financan parton sed ankaŭ disponigi al ni ĉiujn oportunaĵojn por la sukcesigo de nia kongreso.

Ni do kore invitas la junajn esperantistojn tra la mondo nepre veni al la 21-a Kongreso por fari kun ni la unuan manifestacion de la vera tutmondeco de nia Junulara Esperanto-Movado. Samtempe ni nin turnas precipe al ĉiuj gesamideanoj pli aŭ malpli aĝaj, kiuj nun preparas sin por la 50-a UK en Tokio, ke ankaŭ ili konsideru la partoprenon al la 21-a IJK.

La kongreskotizoj estas malaltaj spite la lastatempan prezaltiĝon de vivnecesaĵoj en Japanujo kaj kompare kun tiuj bezonataj por aliaj renkontiĝoj; eĉ malpli altaj ol la kotizoj de la ĝisnunaj IJK-oj, tiom malpli, ĉar ili kovras la elspezojn por ĉiuj aranĝoj por vi, inkluzive de turismaj ekskursoj al Kioto kaj aliaj lokoj, kiuj mem kostas multe larĝa ordinara turisma tarifo.

Do, tuj skribu al viaj landaj sekcioj de TEJO, aŭ al la konstanta adreso de la 21-a IJK, por peti la aliĝilon kaj aliajn informojn. Ĉiuj aliĝintoj al la 50-a UK en Tokio nepre legu la informon pri la 21-a

IJK en la Dua Oficiala Bulteno, kaj junuloj nepre plenigu la aliĝilon en la sama Bulteno! Jen sekvas la necesaj informoj:

Kongreslokoj: La japana centro de Junulargastejoj, en Ootu, Gubernio Siga, por loĝado kaj ĉefaj kunvenoj; kaj Kioto por ekskursoj.

Kotizoj:	<i>antaŭ 1 IV. 1965</i>	<i>post 1 IV. 1965</i>
malpli ol 20-jara	18 US dolaroj	20 US dolaroj
pli ol 20-jara	20 US dolaroj	22 US dolaroj
nemembroj de TEJO	22 US dolaroj	24 US dolaroj

La kotizo inkluzivas veturkostojn de aŭtobusoj inter loĝejo kaj diversaj kunvenejoj, tiujn por la ekskursoj, loĝado kaj manĝado.

Aliĝo kaj pago: Aliĝilon oni sendu al la koresponda adreso kaj la kotizon ankaŭ al la sama adreso per *postmandato*.

Limdatoj: 1 aprilo 1965: post tiu dato iom altiĝos la kotizo.

15 junio 1965: ĝis tiu dato aliĝoj estas nuligeblaj, kondiĉe ke la nuliganto ricevos sian kotizon minus 3 US dolaroj pro jam faritaj elspezoj.

1 julio 1965: lasta dato por aliĝo.

Alvojaĝo: Iro-revena veturado inter Tokio kaj Kioto per nova ultra-ekspresa vagonaro kostas 14 US dolarojn kaj estas aparte pagenda.

Gravas, ke vi sendu viajn komunikajojn per aerpoŝto, por ke ili bonorde kaj ne prokrastite alvenos al la aranĝanto.

EUROPA ESPERANTO KONFERENCO 1965

Dato: De la 11-a ĝis la 17-a de julio 1965

Kotizoj: Inkluzivas la tutan programon kaj la du tuttagajn ekskursojn kun tag- kaj vespermangajoj. Vidu apudan liston:

	anoncoj antaŭ 1-1-1965	anoncoj antaŭ 31-3-1965	anoncoj antaŭ 1-7-1965
	n. gld.	n. gld.	n. gld.
1) Konferencan(-in)o	80.-	85.-	90.-
2) Edz(-in)o de 1)	75.-	80.-	85.-
3) Gejunuloj	70.-	75.-	80.-

Informaterialo: Esperanto-societoj povas ricevi magnetofonan programon kaj la bultenojn de la EEK 1965.

Adreso konstanta: Organiza komitato de EEK 1965

Wien, XV. Fünfhausgasse 16 - Aŭstrujo - Telefono: 83 44 75.

INTERNACIA JUNULARKONFERENCO DE LA FONDAĴO ANNE FRANK 1965
Amsterdam, Domo Anne Frank 25-31 julio 1965

Kiel jam anoncote, la fondaĵo Anne Frank okazigos sian ĉiujaran junularkonferencon por la unua fojo ankaŭ en Esperanto, (krom en la angla lingvo, kiel kutime). De 19 ĝis 25 julio estos anglalingva konferenco, de 25 ĝis 31 sekvos precize la sama programo en Esperanto. La 25-a estos tago komuna al ambaŭ konferencoj. La datoj de estas ŝanĝitaj: ne la unuan semajnon de aŭgusto, sed la lastan de julio vi rezervu por via partopreno! Kotizoj: ĝis 1.IV: 95,-- gld. ĝis 1.VII (limdato por aliĝo): 100,-- gld. Tio inkluzivos loĝadon, manĝadon, ekskursojn, programon. Loĝado en propra hotelo. Aĝlimoj: 18-30 jaroj. Ceterajn informojn petu al: Anne-Frank-Domo, Prinsengracht 263, Amsterdam C, Nederlando.

La temo de la prelegoj estas "KOMUNIKADO". La apartaj titoloj estas sinsekve:

1. Informado kaj reagado -- komunikado en la materia mondo.
2. Sperto kaj konduto -- komunikado en la regno de plantoj kaj bestoj.
3. Kiel la homo povas atingi interhoman kompreniĝon?
4. Rezisto al komunikado.
5. Problemoj de universala lingvo.

Ĝenerala enkonduko:

Komunikado estas tre vasta koncepto. Necesas do precizigi la temon. Nia konferenco limigos sin al "homa interkompreniĝo" en la hodiaŭa mondo. Kiel vi povas konkludi el la programo, la prelegoj sinsekvos kiel ŝtupoj de ŝtuparo. Ni konscias, ke malgraŭ la ĉisupra precizigo estas malfacile, ekzakte redoni la enhavon, sed ni esperas, ke ĝi almenaŭ vekas vian scivolemon kaj la deziron partopreni ĉi tiun konferencon kiu estas speciale grava por vi, geesperantistoj. Internacia lingvo, kiu ajn, sola ne sufiĉas. Por bona komunikado, spirita interkompreniĝo same gravas. Efektive komunikado en ĉi tiu rilato estas la tuto de informado kaj la reago al ĝi.

GRAVA SCIIGO : GRAVA SCIIGO : GRAVA SCIIGO : GRAVA SCIIGO: GRAVA

LA ELEKTOJ DE J.E.N.

Kiel vi scias, ĉiun jaron ni elektas novan estraron de JEN. Nun denove venas la elekta sezono. La nuna estraro, kies nomoj troviĝas sur la interna kovrilpaĝo de la JEN-Bulteno, gvidis la organizon tra ĝia dua plena ekzistojaro, dum kiu JEN spertis, kaj plejparte venkis, novajn problemojn, kaj progresis al novaj atingoj.

La proceduro de la elekto estas klare indikita en la statuto de JEN. Unue la nuna estraro devas decidi pri la nombro de membroj kiun havos la venonta estraro. Per ĵus finita voĉdonado, la nuna estraro decidis ke la venonta estraro havos ses membrojn.

Tio signifas ke ni devas havi almenaŭ ses kandidatojn, kaj ni bezonas vin por liveri tiujn kandidatojn. Laŭ la reguloj, por ke ies nomo aperu sur la balotilo, la sekretario de JEN devas ricevi antaŭ la unua de majo proponon de lia kandidateco, subskribitan de almenaŭ du membroj de JEN.

Pro la malfrueco de ĉi tiu informo, ni akceptos proponojn ĝis la 15-a de majo. Ĉiu propono povas porti deklaron ĝis 100 vortojn longan favore al la kandidato. En la maja-junia numero de la JEN-Bulteno aperos la deklaroj por ĉiuj kandidatoj kaj balotilo por la voĉdonoj de la membroj.

Memoru ke nur membroj de JEN rajtas proponi kaj kandidatiĝi - sed ke ĉiuj membroj de JEN havas respondecon elekti la plej bonan kaj efikan estraron por gvidi la organizon tra la venonta jaro. Do, nepre faru ankaŭ vian kontribuon en ĉi tiu grava tasko.

Proponojn sendu al: Ann Bodine, Sekretario de JEN, Sage Hall, Cornell University, Ithaca, New York, 14850.

LA KRUELA MILITO
(The Cruel War)

LA CITRONARBO
(The Lemon Tree)

SE MI HAVUS MARTELON
(If I had a Hammer)

Milito deprenas	• Mi estis nur dekjara knab',	Se mi havus martelon,
Joĉjon for de mi:	• La patro vokis min:	Mi martelus matene,
Al batalo mi volas	• "Alvenu kaj la citronarb'	Mi martelus vespere
Iri kun li.	• Kun saĝ' instruos vin -	Tra l'tuta land'
Al batalo mi volas;	• Ne fidu amon, mia knab''	Mi martelus danĝeron,
Ho tristas mi, ho ve!	• La patro petis min,	Mi martelus gardene,
Ĉu mi ne povas iri?	• "Vi poste trovos ke la	Mi martelus la amon
"Ne, kara, ne."	• Citronarb' similas ĝin!	inter fratoj kaj frat
Morgaŭ dimanĉos,	• Citronarb' kiel bela	Tra l'tuta land'.
Kaj lundon je aŭror'	• Kaj tre dolĉas la florar'	
Via estro alvokos	• Sed la frukt' de la citrono	Se mi havus sonorilon
Kaj vi marŝos for.	• Estas plena je amar'.	Mi sonorigus matene,
La estro alvokos;		Mi sonorigus vespere
Ho tristas mi, ho ve!	• Iam sub la citronarb'	Tra l'tuta land'.
Ĉu mi ne povas iri?	• Mi kuŝis kun knabin'	Mi sonorigus danĝeron
"Ne, kara, ne".	• Dolĉa ke kun ŝia rid'	Mi sonorigus gardeme,
La harojn mi tondos	• La steloj montris sin.	Mi sonorigus la amon
Kaj vire vestos min:	• Someron ni pasigis	inter k.t.p.
Esti kunkamaradoj	• Subarbe kor' al kor'	
Oni pensos nin.	• Kaj ŝia rid' la patrajn	Se mi havus nur kanto
Kiel kamaradoj	• Elmuzikis for: <u>vortojn/</u>	Mi kantus ĝin matene,
Ni marŝos kun l'arme'.	• Citronarb' kiel bela..ktp.	Mi kantus ĝin vespere
Ĉu mi ne povas iri?		Tra l'tuta land.
"Ne, kara, ne".	• Unu tagon sen parol'	Mi elkantus danĝeron,
Ho Joĉjo, ho Joĉjo,	• La sunon prenis ŝi	Mi elkantus gardeme
Vi tro krueblas, ĉar	• Kaj en mallum' de ŝi lasita	Mi elkantus la amon
Mi vin amas pli multe	• Ekkomprenis mi:	inter k.t.p.
Ol la tuta homar'.	• Favore al alia	
Mi amas pli multe	• Ŝi abandonis min;	Jen, mi havas martelo
Kaj amos vin sen ĉes'..	• Pli trista homo sed pli saĝa,	Kaj mi havas sonorilo
Ĉu mi ne povas iri?	• Nun alkantas vin:	Kaj kanton povas kant
"Jes, kara, jes".	• Citronarb' kiel bela..ktp.	Tra l'tuta land'
		La martelo de justo
		La sonoril' de libero
		La kanto pri la amo
		inter k.t.p.

VALO "RUĜA RIVERO"
(Red River Valley)

LA KRIO
(mel. My Bonnie)

1. El ĉi tiu val' baldaŭ vi iros;
La maleston de vi sentos ni.
Viaj brilaj okuloj kaj rido
Faras gajon por ni tie ĉi.
2. Apud mi sidu kara amato;
Ne nun diru "Adiau" vi min.
Valon "Ruĝa Rivero" memoru;
Tie vere vin amas fraŭlin'.
3. Pensu nun pri la val' forlasota;
Ĉagrenema sen vi estos ĝi.
Ne forgesu pri tiu ĉagreno
Kaj ĉagren' kiu kaŭzos min vi.
4. El ĉi tiu val' baldaŭ vi iros;
Eble mi povus iri kun vi.
Kial mi devus resti ĉi tie
Se mi ja amas vin pli kaj pli.
5. Vian hejmon ĉe l'maro vi iros.
Revu pri tiu temp' sur la voj',
Kiam en valo "Ruĝa Rivero",
Interŝanĝis ni amon kun ĝoj'.

' Sur stepo kaj mont' indianoj
' Ĉasadas kun ruĝfamili'
' Kaj se vi postulas parolon
' El kanjon' respondus la kri';
' ESPERANTO JEN ESTAS LA LINGVO POR NI
' ESPERANTO JEN ESTAS LA LINGVO POR NI
' En densa afrika ĝangalo,
' Sovagaĵ nigruloj sen di'
' Jam solvis la lingvan problemon,
' Per tam-tam' vojaĝas la kri':
' ESPERANTO, k.t.p.
' Ĉe norda poluso eskimoj,
' Loĝadas en neĝo, glaci;
' Kaj kiam parolo necesas
' Trans blanka dezert' sonas kri': E-kt
' Tra tuta la vasta terglobo,
' En urbo do ĉiu naĉi'
' Troviĝas la samideanoj
' Aŭdiĝas la tutsama kri:
' ESPERANTO k.t.p.

#####

SANKTA LUĈIA

Sur lunbrileta mar' en silento
Kun lula ondo ludas la vento.
Venu, atendas vin, barketo mia
Sankta Luĉia, Sankta Luĉia.
Ho Neapolo flora ĉiela,
Al enreviga sorĉo fabela.
Logas la noktsilent' mara, magia,
Sankta Luĉia, Sankta Luĉia.
Venu kondukos, kun dolĉa senta,
Vin lula ondo tra luna ĝento.
Al paradizo kun, feliĉo dia,
Sankta Luĉia, Sankta Luĉia.

' En barak', kastelo, palaco,
' En hejmoj de ĉiu speci'
' Gepatroj instruas infanojn
' Lispigas de buboj la kri':
' ESPERANTO k.t.p.
' Indianoj, nigruloj, eskimoj,
' Geavoj kaj buboj kaj ni
' Jam uzas la Zamenhoflingvon,
' Do vivu, prosperu la kri!
' ESPERANTO, k.t.p.
' #####
' LI ESTAS BONEGULO
' (He's a Jolly Good Fellow)
' Li estas bonegulo,
' Li estas bonegulo
' Li estas bonegulo
' Konsentas ĉiuj ni.
' Si estas bonegulino, k.t.p.

#####

JEN KONGRESO - 1965

Oratora konkurso, ekskurso tra Portland (La Urbo de Rozoj), teatraĵo, kaj bongusta bankedo atendas vin ĉe la 3-a kongreso de JEN! La Esperanto Societo de Portland, Oregon gastigos JEN kaj ELNA en la 13-a nacia kongreso de Esperanto, okazonta la 22-an ĝis la 25-an de julio, 1965.

Favoraj kotizoj jam estas aranĝitaj por JENanoj ĉe la kongreso! Anstataŭ \$10.00, vi pagos nur \$5.00. Kaj eĉ la hotelo proponas siajn ĉambrojn kun rabato por JENanoj je \$3.50 nokte kun po kvar personoj en ĉambro.* La JEN-grupo ĉe Portland State College ankaŭ planas specialajn eventojn por JENanoj, siaj propraj gastoj dum la kongreso.

Ni urĝe petas vin ĉeeston de nia kongreso, kaj ni promesas, ke vi memoros ĝin ĉiame! "Okcidentenvojaĝu, junulo!" skribis Horace Greeley; kaj ni ripetas: "Okcidentenvojaĝu, junulo!"

Tom Davidson,
Portland State College

*Sendu kotizojn al S-ino Carol Belles, 6011 S.E., Gladstone St., Portland, Oregon 97206.

A lending library has been set up for the use of all JEN members:

The purposes of the library are to acquaint members with the international Esperanto press, and to provide material for members who want to perfect their command of the language by reading articles written in international style. This will be done by lending sets of four Esperanto magazines to members for periods of three weeks. Every member may borrow, one at a time, as many sets as he desires. All the magazines will be less than a year old, and care will be taken to see that no one receives the same set twice.




The library will also lend magazines or other Esperanto materials of special interest to members putting on displays or exhibitions.

Both of these services are free, except for the cost of postage. To borrow a set, simply send 10¢ in coin or unused U. S. stamps to the address below. The wrapper in which the magazines arrive can, if opened carefully, be used to return them in. The magazines you borrow may be keys of understanding that will open doors to your better knowledge and enjoyment of the wide, wide world of Esperanto. Write to the

JEN Lending Library
2475 Linden Avenue
Long Beach, California

Since the library operates with donated literature, please send any magazines for which you no longer have any use, that are in or about Esperanto, to the same address.

On another page of this issue of the JEN-Bulteno you will find the beginning of a new JEN-Kantaro. A further four pages will be published in the May-June issue. You will then be able to detach all eight pages and staple them together, in booklet form.





Se eĉ la teksto ŝokis vin, dank' al Dio ke mi ne havis la ilustritan eldonon!

NEKONTENTIGA STATO DE INDIVIDUAJ
SUBSKRIBOJ

En la nuna momento, laŭ la informoj ĵus ricevitaj el la Centra Oficejo, la stato de subskriboj je la propono prezentota al UN estas: 30.354 individuaj subskriboj kaj 164 organizaĵoj kun entute 2.087.205 membroj. Se la progresado de la kolektado de subskriboj de organizaĵoj estas relative kontentiga, la nuna stato de individuaj subskriboj estas katastrofe malbona.

La fakto estas, ke kelkaj sindonaj esperantistoj jam kolektis multajn subskribojn. La rekordon certe havas s-ro H. Müller el Germanujo, kiu antaŭ kelkaj tagoj, precize je sia naskiĝtago, kolektis la milvinentan subskribon. En Saarlando s-ro R. Hauptenthal kaj s-ro G. Becker kolektis plurajn centojn da subskriboj. Se oni kalkulas inter la maksimumo de 1.500 kaj la minimumo de unu sola subskribo, kaj se oni prenas kiel mezan nombron proksimume 50 subskribojn por ĉiu persono, kiu eklaboris sur tiu ĉi kampo kaj resendis la foliojn al la C.O. en Rotterdam, montriĝas ke ĝis nun proksimume 600 personoj partoprenis en la agado. Eĉ se ni prenas larĝe mil personojn, restas la fakto ke tio estas nur frakcieto de la tuta membraro de UEA. Tio fakte montras, ke el pli ol 32.000 esperantistoj organizitaj en UEA, mil eklaboris kaj 31.000 faris nenion. Tia nekredebla neglektado de tiel esence grava kampanjo estas apenaŭ komprenebla. 253 kvalifikitaj personoj proponas UEA por la Nobel-Pacpremio en 1965; ministroj kaj urbestroj kaj sciencistoj neesperantistaj subskribas la proponon al UN, sed nia esperantistaro apatie atendas, ke io bona okazos sen ĝia partopreno. Eĉ multaj landaj asocioj faris ĝis nun nenion. Eĉ multaj fakaj Esperanto-organizaĵoj ĝis nun ne subskribis la proponon. Se ni havus je dispono 10 jarojn aŭ pli, la situacio ne estus alarma. Sed ni havas je dispono ankoraŭ nur kelkajn monatojn, nome ĝis oktobro 1965. Kaj ĝis tiu tempo necesas kolekti almenaŭ unu milionon da individuaj subskriboj, se ni volas entute ion seriozan

(daŭrigo sur p. 19)

(daŭrigo de p. 4)

aŭ (b) la koncerna persono ne uzas tiun sistemon. Cetere, la afero estas multe pli komplika. Necesus iel indiki, ke la familia nomo de Karel Van Den Oever (flandro) komenciĝas per V, tiu de Frederik van Eeden (nederlandano) per E, kaj tiu de Nguyen van Kinh (vjetnamo) per K. Plie, ke en alfabeto listo Honoré de Balzac (franco) aperu sub B, dum Edmondo De Amicis (italo) aperu sub D. Kvazaŭ tio ne sufiĉus, oni devas atenti, ke la brazilanoj A onso Celso kaj Coelho Neto listiĝas ambaŭ sub C, kaj iliaj samlandanoj Alceu Amoroso Lima kaj Barbosa Lima Sobrinho ambaŭ sub L!

Simpla kaj klara sistemo estus: rezervi la majusklojn sole por tiuj nomoj, kiuj difinas la alfabetan ordon. Sekve: Maŭ zedong, william Shakespeare, Petöfi sandor, nguyen van Kinh, edmondo De amicis (aŭ edmondo De Amicis), Miyamoto masao, miguel de Cervantes saavedra, alceu amoroso Lima, ktp.

Kiel akceptus tion niaj legantoj?

(el Revuo Esperanto)

Victor Sadler

#####

DEZIRAS KORESPONDI. . . .

Esperantistoj en Argentino. Skribu al f-ino Glady del Valle Aráoz, La Plata 162, San Miguel de Tucumán, Argentino.

Fizikisto ĉe maŝinentrepreno kaj universitata studento pri fakaj aferoj -- Otto Zurek, Žďár/Sáz-Vysočany 810, Ĉekoslovakio.

Juna estono -- Harry Våljari, Saarepuu 9, Tallinn 9, Sovetunio.

19-jara lernantino en ekonomia lernejo, pri ĉiuj temoj per poŝtkartoj -- Maria Michajlova, str. Br. ŝukerov 3, Plovdiv, Bulgario.

(daŭrigo de p. 17)

entrepreni. De 30.000 ĝis unu miliono la vojo estas tre longa. Ĉar ni ne estis tre diligentaj ĉe la starto kaj dum la unuaj kilometroj, des pli ne devas rapidigi nian iradon en la sekvantaj monatoj, komencante absolute tuj.

Mi apelacias al ĉiuj organizaĵoj kaj unuopuloj, kiuj legas tiujn ĉi liniojn, ekagi senprokraste. Aparte mi petas popularigi la kampanjon per:

1. Artikoloj en la Esperantaj gazetoj instigante al kolektado de subskriboj kaj menciante la plej taŭgajn metodojn por tiu celo (vidu cirk. JIK 6/1964);
2. Cirkuleroj al la lokaj grupoj kun la samaj instigo kaj informoj;
3. Prelegoj kaj informoj okaze de esperantistaj kunvenoj. Plue mi petas instigi ĉiujn sendi tuj la plenigitajn foliojn al la C.O. de UEA, tiel ke ni havu ĉiam kiel eble plej ĝisdatajn informojn kaj ne amasiĝu tro da folioj en la postaj periodoj.

Mi ege esperas, ke ĉiuj komprenos la gravecon de tiu ĉi afero kaj ekagos sen prokrasto. Ni ne preterlasu tian unikan okazon, kia estas la nuna, ĉar certe tiaj okazoj ne prezentiĝas ĉiujare. Oni ne povas prezenti la proponon okaze de la JIK en 1970 aŭ en 1980, sed oni devas tion fari en la jaro 1965. Ankoraŭ estas tempo por kolekti ĝis oktobro ne unu milionon, sed eĉ pli da subskriboj, se ĉiu faros sian devon.

Kun estimo kaj koraj salutoj,

Ivo Lapenna, Prezidanto,
Universala Esperanto-Asocio.

NOTU ke folioj por subskriboj de la propono al UNO estas haveblaj de la usona organizanto de la kampanjo -- Paul Stein, Box 6251, San Diego 6, California.